

BELGA ESPERANTISTO

46a Jaro — N-ro 5a — Majo 1954a

Fondita
en 1908a



Redaktejo-Administrejo :
de la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

S-ro Maurice JAUMOTTE, Prezidanto de nia Ligo

D-ro P. Kempeneers honorigata per la unua Ora Medalo de la Ligo

Sabaton, la 24an de aprilo okazis la ĝenerala jarkunsido de Rega Belga Ligo Esperantista, pri kiu oni trovos raporton en tiu ĉi numero de nia revuo.

La du gravaj faktoj, en tiu ĉi kunsido, estis la elekto de S-ro Maur. JAUMOTTE, vicprezidanto de la Ligo kaj prezidanto de la antverpena sekcio „La Verda Stelo”, por anstataŭi D-ron P. Kempeneers; kaj la transdono, - fare de la nova prezidanto, - de la unua ora ekzemplero de novstarigita MEDALO de BELGA LIGO ESPERANTISTA al la eksiginta prezidanto.

Ni ĉi sube presigas la unuan saluton de la nova Prezidanto:

Mi konsideras, samtempe kiel gravan taskon kaj kiel grandan honoron, mian elekton al la prezidanteco de nia Ligo; posteno en kiu nur kvin eminentuloj antaŭiris min.

Kaj mia unua ago volas esti honoriga memorigo de tiuj antaŭuloj, ĉiuj senlacaj laborintoj sur la kampo de nia komuna idealo:

La unua, - vera giganto sur la tiama scenejo, - konata Kongo-esplorinto, lerta oficiro kaj profesoro, fine unua direktoro de nia tiam ĵusstarigita Kolonia Universitato: Charles LEMAIRE, al kiu ni vere ŝuldas, ne nur la ekiĝon, sed la unuan antaŭenpuŝon de la movado en nia lando; kaj ankaŭ grandan dankemon eĉ malgraŭ la fakto, ke li forlasis nian movadon por iĝi skismulo, propagandisto de Ido kaj poste de projekto, de li mem starigita.

La dua, S-ro Amatus VAN DER BIEST-ANDELHOF, kiu, - en la malfacilaj momentoj, kiam Belga Ligo estis skuata pro tiu prezidanta deflankiĝo kaj pro la idista demando entute, - kuraĝe reprenis la gvidadon, helpata de diversaj fidelaj antverpenanoj, kiuj tuj



S-ro Maur. Jaumotte

eldonigis, - anstataŭ „Belga Sonorilo”, kiu iĝis idistlingva, - nian nun ankoraŭ ĉiam vivantan kaj flortantan „Belga’n Esperantisto’n”.

La tria, S-ro A. J. WITTERYCK,

unu el la plej malnovaj pioniroj, antaŭa volapukisto kaj kiu starigis la nun plej malnovan grupon de nia Ligo, la Bruĝan Grupon Esperantistan, la nuran en nia lando, kiu estis honorigata per la honora prezidanteco de nia Majstro mem.

Lakvara, S-ro Frans SCHOOFS, kiu, tuj post la unua mondmilito kaj ĝis sia preskaŭ subita morto en 1934, estis vere la spino de nia movado enlanda kaj ankaŭ grandparte eksterlanda kaj kies anstataŭigo igis kelkajn inter ni ekpreni sur sin taskojn kiuj, ĉiu aparte, sufiĉus por dronigi homon sub la laboro.

La kvina, D-ro Paul KEMPE-NEERS, kiu de oktobro 1934 kaj do dum pli ol 19 jaroj, prezidis nian Ligon, kun lerteco, kiun mi ne devas priskribi nun, ĉar ĉiu ĝin same bone konas kaj ĉar ni havos, dum la Kongreso en Lieĝo, okazon por memorigi pri ĝi.

Mi promesas, je tiu ĉi momento de la reprene de lia tasko, fari mian eblon, ne nur por konservi al nia Ligo ĝian nunan forton; sed mi volas klopodi, - kun via ĉies helpo, - igi ĝin ĉiam pli bela, ĉiam pli forta, por ke ĝi, en glo-ro, povu, ne nur festi baldaŭ sian oran jubileon, sed kunhelpadi, sur la internacia laborkampo, al nia fina venko.

Estas kun tiuj pensoj, ke mi salutas nian membraron kaj ke mi ĝin alvokas al plia, ĉiam pli efika laboro.

Maur. JAUMOTTE.

Reĝa Belga Ligo Esperantista

Administrantara Kunsido

Dum la administrantara kunsido, kiu antaŭiris la Ĝeneralan Jarkunsidon de la 24a de aprilo, la administrantaro aprobis la raporton de la antaŭa kunsido, prezentitan de S-ro Soyeur, kaj la kalkulojn por 1953a, kunmetitajn de S-ro Plyson.

Ĝi aŭdis klarigojn pri la intergrupa konkurso, en kiu la Verviersa Grupo gajnis la premion „Antoinette Jen-nen“; pri „Belga Esperantisto“, por kies prezento kaj enhavo la prezidanto gratulis la redaktoron; pri la Beneluksa Kongreso, kies kompleta programo nun estas kunmetita; pri la gazetara servo, bonege prizorgata de S-ro M. Pilloy, kaj pri kelkaj pliaj punktoj.

Ĝenerala Jarkunsido

D-ro Kempeneers bonvenigis la multajn ĉeestantojn, venintajn el la diversaj landpartoj kaj inter kiuj grava delegacio de la Antverpena Grupo „La Verda Stelo“.

S-ro Soyeur legis la tre detalan raporton pri la agado de la Ligo dum la pasinta jaro kaj S-ro Sielens tiun pri la financa situacio.

La prezidanto dankis S-ran Soyeur kaj S-inon Plyson, kiuj tiel bone prizorgis la aferojn. Li ankaŭ dankis kaj individue gratulis la vicprezidanton, la ĝeneralan sekretariojn kaj la administrantojn kaj komisarojn.

Li aludis sian tujpostan eksigon, memorigis pri sia longa prezidanteco kaj pri la plej gravaj okazintaĵoj dum tiu periodo kaj emociis alvokis ĉiujn daŭrigi siajn klopodojn por la triumfo de nia idealo.

Li tiam, post aprobo de la bilanco kaj de la kalkulo pri perdo kaj profito, akceptigis la liston de la novaj administrantoj, kiu estis unuanime aprobata kaj kiu konsistas el:

S-roj M. Jaumotte; H. Sielens; J. Verstraeten kaj G. Van den Bossche (delegitoj de „La Verda Stelo“, Antverpeno); S-roj Ch. Poupeye kaj D. De Meulenaere, (Brugla Grupo); S-ro J. Plyson kaj S-ro M. Pilloy (Brusela Grupo); S-ro J. Koeune (Verviersa Grupo); S-ro Paulus (malgrandaj grupoj kaj izoluloj); S-roj P. Kempeneers, J. Soyeur kaj Th. Van Gindertaelen (kooptaj alelektitoj). Tiu ĉi estas, — kiel oni scias, — por kvar Ligoj, la komuna administranto de la revuoj.

D-ro Kempeneers gratulis ĉiujn pro ilia elekto kaj tiam petis S-ran M. Jaumotte daŭrigi la prezidon de la kunsido, ĉar, — jam en januaro, — la administrantaro decidis ke, — ekde la ĝenerala kunsido, — la estraro konsistos el: S-ro Jaumotte, prezidanto; S-ro J. Soyeur, vicprezidanto, kaj S-



39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando.

31-an julion - 7-an aŭguston 1954

Nro 7

OFICIALA KOMUNIKO

Aprilon 1954

JAM PLI OL 2000 ALIGINTOJ! L.K.K. NE PLU AKCEPTAS ALIGOJN!

Pagoj: GRAVE! Malgraŭ avizoj kaj instrukcioj, homoj daŭre sendas ĉekojn el eksterlando sen la aldonon de la makleroj de la Nederlanda banko (fl. 0.50). L.K.K. debetas la konton de la koncernaj pagintoj. Tio kaŭzos atendadon ĉe la kasgiĉeto en la kongresejo. Estus dezirinde, ke tiuj malgrandaj ŝuldoj estu likviditaj antaŭ la kongreso (eventuale per rpk. 1 rpk. fl. 0.25).

Ekskursoj: Evidentas, ke multaj kongresanoj ne zorge legis la instrukciojn. La tuttagaj ekskursoj okazos en la sama tago: jaŭdon, 5-an de aŭg. La ĉiutagaj ekskursoj okazos nur lundon, mardon, merkredon kaj vendredon. Ni jam devis resendi plurajn mendilojn pro malgustaj mendoj. Bonvolu ne skribi sur la mendilojn komunikojn nerilatajn.

Loĝado: Kelkaj mendintoj miskomprenis la instrukciojn. La makleroj guld. 2.50 estas por ĉiu mendo (= ĉiu persono). Multaj mendintoj supozas, ke estas avantaĝo sendi la mendilon senpere al Haarlem kaj la pagon al Peranto. Tiel ne estas. En tiaj kazoj la mendilo kuŝas ĝis avizo de la Peranto. Sendu la dokumentojn kaj la pagon ĉiam al la sama instanco. Bonvolu ne skribi apartajn komunikojn sur la mendilon!

Libroservo: Dum la kongreso funkcios Libroservo en kiu havas solvendrajton la libroservo de L.E.E.N. (S-ro S. Mabeoone-Visser, 122 Pythagorasstraat, Amsterdam-O). Eldonistoj, kiuj havas intereson vendi siajn librojn dum la U.K. bonvolu kiel eble plej baldaŭ arangi la aferon.

Statistiko (ĝis 31 marto): Algerio 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 9, Belgujo 52, Brazilio 3, Britujo 272, Danujo 64, Finnlando 38, Francujo 227, Germanujo 205, Hispanujo 11, Indonezio 1, Irlando 4, Italujo 73, Japanujo 1, Jugoslavio 75, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 550, Norvegujo 109, Novzelando 12, Portugalujo 7, Svedujo 241, Svislando 26, Turkujo 2, Usono 8. Sumo el 27 landoj: 2000 (pasintjare 960).

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario

ro H. Sielens, ĝenerala sekretario-kasisto.

La nova prezidanto dankis ĉiujn pro la fido kaj la honoro; memorigis siajn antaŭulojn en la prezidanta funkcio; gratulis kaj dankis ĉiujn, kiuj jam helpis kaj promesis daŭrigi sian helpon, kaj ankaŭ S-inon Plyson, kiu, — je lia bedaŭro, — decidis ekŝiĝi el sia kasista funkcio, je tiu ĉi iom malfacila momento de la eklaboro de nova estraro.

Fine, li korege dankis D-ran Kempeneers pro la farita laboro; esprimis la esperon, ke li daŭrigos tamen kunlabori en aliaj funkcioj kaj petis senkulpigon pro unua diktatoreca ago, kiun li plenumis.

Kuraĝigita pro la januara decido de la administrantaro rilate al lia prezidanteco, li decidis stampigi, — ankaŭ antaŭ la Jubilea Jaro 1955a —

Medalon de Belga Ligo, pri kiu ĉiuj jam konsentis, kaj pinglis sur la bruston de la prezidinto, la Oran Medalon, unuan ekzempleron de tiu ĉi bela medalo, kiu reprezentas fidele la unuan sigelon de la Ligo.

Kortuŝitaj ambaŭ, la nova kaj la eksiginta prezidanto enbrakiĝis kaj D-ro Kempeneers, per lasta vorteto, dankegis pro tiu unika memorajo.

Longaj aplaŭdoj kvitigis la prezidanton pro lia diktatoraro kaj alportis al la prezidinto la konfirmon de ĉies simpatio kaj danko.

S-ro Jaumotte tiam fermis la kunsidon, post legado de kelkaj salutvortoj, skribitaj i.a. de S-ro Elworthy-Pose-naer; de S-ro Van den Bossche, kiu ĵus, por iom longa periodo, reeniris sanatorion; de S-roj Cl. Van de Velde kaj M. De Ketelaere, malhelpataj, k.t.p.

Beneluksa Esperanto-Kongreso, Lieĝo, Pentekosto 1954-a

Kvankam la aligiloj aldonitaj al la Aprila numero reŝule envenas, ni ree insistas por ke la kongresanoj kiel eble plej frue ensendu kaj faru la necesajn pagojn je la indikita poŝtekkonto. Ne hezitu kaj faciligu la laboron de la L.K.K.

Lieĝo atendas vin ĉiujn. Ĝis baldaŭ!

— KONGRESKOMITATO — HONORAJ MEMBROJ —

S-roj: A. BUISSET, senatano, ministro; L. E. TROCKET, senatano, ministro; F. CLERDET, Provincestro; P. GRUSELIN, urbestro de Lieĝo; J. J. MERLOT, urbestro de Seraing; P. HARMEL, Eks-Ministro por Publika Instruado; O. PETRY, provinca estrarano; F. RENARD, provinca estrarano; M. DESTENAY, skabeno kaj deputito; la Skabenoj O. GILBART, M. DENIS, J. LEMAIRE, Ch. BAILLY, J. ARETS, M. NOIRFALISE; LHOEST, konsulo de Nederlando; J. WURTH, Konsulo de Luksemburgo; G. DEJARDIN, deputito; J. KIRMEZ, provinca prezidanto de la Belga Ruĝa Kruco; J. HENRION, prezidanto de Komerca kaj Industria Ĉambro de Lieĝo.

— LOKA KONGRESA KOMITATO —

Prezidanto: J. M. P. DESONAY.

Vic-prezidantoj: D-ro T. VAN GINDERTAELEN kaj F. WEEKE.

Sekretario: J. Soyeur, rue du Chêne, 91, Seraing.

Kasistino: S-ro J. Plyson (p.ĉ.k. no. 1006.30).

Festkomisaro: M. Guyot.

Propaganda Fakto: J. Koeune kaj J. Van der Meersch.

— EJOJ —

Akceptejo: Oficejo de Turismo, ĉe la elirejo de la stacidomo LIEGE-GUILLEMIN.

Kunsidejo: Hotelo VENITIEN, Place de la République Française (Teatro).

Vesperfesto: Hotelo VENITIEN.

Festeno: Vaxelaire-Claes, Place Maréchal Foch (100 m. de VENITIEN).

Balo: Dancejo „BEAULIEU“, Place St-Paul (apud la Katedralo).

Diservo por Katolikoj: Preĝejo St Sacrement, Boulevard d'Avroy, 132.

Lunda Tagmanĝo: Societo „L'HARMONIE“, 6, Avenue Delchambre, HUY.

— PROGRAMO —

Sabato, 5-an de junio 1954:

13.30 h. Malfermo de la akceptejo, informejo kaj transdono de la kongresaj dokumentoj.

16 h. Jarkunsido de Belga Esperanto-Instituto.

17 h. Gvidata promenado tra la urbo.

17 h. Laborkunsido R.B.L.E. — Ligestrarkunsido de F.L.L.E.

20 h. Oficiala Malferma Kunsido de la Beneluksa Kongreso.

21 h. Festvespero.

Dimanĉo 6-an de junio:

9-a h. Diservo por Katolikoj (preĝejo St Sacrement, boulevard d'Avroy, no 132.) kun prediko de A.

LIÈGE (BELGIQUE)



La Cité du Bon Accueil...

OFFICE de TOURISME
PLACE S. LAMBERT ET GARE
DES GUILLEMIN.

bato MULLER, el St-Vith.

9.30 h. Malfermo de la akceptejo. — Fermo je 11 h. 30.

10 h. Solena kunsido R.B.L.E.

10 h. Jarkunsido Flandra Ligo.

12 h. Akcepto en la Urbdomo (Place du Marché).

13 h. Oficiala Fotografado (loko fiksota).

13.30 Komuna Tagmanĝo (Magazeno VAXELAIRE-CLAES, Pl. Maréchal Foch).

15.30 Promenado tra la urbo. Vizito de muzeoj(?)

20 h. 30 Balo en „Beaulieu“, place St-Paul.

? Jarkunsido de Flandra Esperanto-Instituto en „Hotelo Venitien“.

Lundo 7-an de junio.

9 h. Enŝipiĝo en boato „André-Lulu“, ĉe la ponto „Passerelle“. Vojaĝo al HUY, laŭ Ougrée, Seraing, Val-St-Lambert, Amay. Alveno en Huy ĉ. 12 h. 45.

13 h. Komuna tagmanĝo en salono de la societo „L'Harmonie“.

14 h. Vizito de la turisma urbo Huy.

ĉ. 17 h. Reiro fervoje al Lieĝo. (la horaro de la vagonaroj ankoraŭ ne estas fiksita de la S.N.C.B.) — Disiro.

L.K.K.

LA LITERATURA RAPORTAJO de Stijn Streuvels.

(Kun afabla traduk. kaj prespermeso de la aŭtoro, el la flandra: *Hedero*.)

Alia tempo, aliaj moroj.

Antaŭe oni lasis Artistojn, Skulptistojn, Pentristojn, Poetojn kaj Verkistojn al ilia verkado.

Ĉiu kiu okupigis pri arto, penadis en la kvieto, izolite, kaŝite, sola. La popolo ricevis la produktojn de ilia arto; — kiel bakisto liveras la panon laŭ ĝi forlasas la fornon, por satigi ĉiun malsatanton, tiel artistoj liveris la spiritan panon al ĉiu, kiu anime malsatis. Ja neniam okazis ke tia spirita bakisto forlasis sian knedujon kaj laŭtigis antaŭ la popolo la voĉon por paroli... pri si mem kaj pri sia arto.

La tempo ŝanĝigis; nun la publikon ne plu kontentigas la produktoj, solaj, de la artisto; ĝi volas la artiston mem. La publiko ja ankoraŭ ne volas kredi ke la artisto estas homo kia alia, homo kiu, kun denaska talento, pliigas tiun talenton en iun direkton kaj pri-traktas belajn, kiel forĝisto prilaboras feron, ĉarpentisto lignon. Ankoraŭ ĉiam la homoj vidas en tio ioman magion kaj, kiel pri ĉio kie intervenas mistero, ili volas funde ekscii kiel skulptisto hakas siajn bildojn, pentristo pentras siajn pentraĵojn kaj poeto verkas siajn versojn. Centfoje oni jam diris kaj ripetis: ke ĉiu spirita laboro okazas interne. Sed ĉe internaj aferoj nenio estas videbla kaj tial la homoj ja ne volas kredi tion, ne konsentas kaj ĉar, ĉe la interna, la vera spiritalaboro oni vidas nenion kaj oni povas pri ĝi malmulte rakonti — tial la publiko interesiĝas pri flankaj, pri kio ĉirkaŭas la metion, pri la manieroj, la kutimoj, agoj kaj faroj de la artisto, pri la artisto mem. Kie la publiko ne povas penetri, tie ĝin bonege helpas la literatura raporto.

Antaŭe la kritiko ekzistis nur por la artisto. La rolo de la kritiko servis por konsigli la artiston pri si mem; estis io ekskluzive propra al la fako, kaj tio interesis nenion eksterstaranton. Pro la granda disvastiĝo de la revuoj, kiuj ampleksas ĉiujn artojn kaj kie oni precipe trovas studojn pri artaĵoj kaj artistoj, la kritiko nun, hodiaŭ, direktas sin al la publiko pli ol al la artistoj. La prijuĝanto precipe ŝatas unualoke reliefigi sian propran spiriton — li devas montri ke li per unu konsidero, per supraj enrigardo (ĉar pli da tempo tiu aktivulo ne povas dediĉi al tio) scias pri tio pli ol la artisto mem. Estas li kiu diras kiel devas esti kaj kiel ne povas esti. Estas li kiu scias, esploras la kaŝitajn liniojn malantaŭ la verko, kiu spionas malantaŭ la kulisojn... kaj eldiras siajn verdiktojn per la necesa forto, propra al lia alstara ofico. Tiuj prijuĝoj — kiuj estas pli rekomendoj kaj malaproboj, kiujn la aĉetanto eble profitu — ne povas esti tro sekaj aŭ tro mono-

tonaj, alie la publiko ne sufiĉe „mordus“; tial flankaj iom spicu ilin kaj tiel komenciĝas la raporto... Pro tiu agmaniero la publiko lernis interesiĝi pli pri la artisto ol la artaĵo kaj tiu intereso nun fariĝas unualoke: scivolo. La granda homa leĝo tekstas: ke ĉie kaj en ĉio la homo serĉas sin mem; nun la publiko lernis serĉi la homon malantaŭ la artaĵo kaj tute interesiĝis pri la homo.

La spicisto demandas al si:

— Kiom diferencas ja sinjoro kiu verkas versojn kaj iu kiu uzas la paperon de verskolekto kiel saketojn? Kaj en kio tiu homo diferencas de alia? La raportisto rakontos tion al la homoj. La literatura raportisto estas la peranto inter la artisto kaj la publiko — la viro kiu profesias tion, kiu ekiras — mi ne diros: kiel blekanta leono, serĉanta kiun disŝiri, sed tamen: iom kiel ĉasisto serĉanta viktimon...

En la persono de dece vestita junulo, plej ofte, la raportisto eniras ĉe la artisto, faras la kutimajn klinojn, ekskuzas sin pro la maldiskreta invado, kion li provas pardonigi per la interesiĝo kiun li montras por via arto kaj la arto ĝenerale. Li evitas klarigi la veran kialon de la vizito — li nur iom babilas, babilas ja senĉese; ne timu ke neceso unu vorto de vi! Li ekadmiras vian ĉirkaŭaĵon, la bildojn sur la muro, la librojn sur la tablo, vian personon, vian edzinon kaj viajn infanojn, la legomojn kaj la arbojn en via ĝardeno, vian vilaĝon kaj la vilaĝanojn, vian bovon, vian azenon, unuvorte ĉion kio apartenas al vi. Sed li precipe admiras vian laboron, kion vi faris, kion vi faras, kion vi faros. Li asertas al vi ne estas sufiĉe estimata, ke via laboro ne estas sufiĉe konata, ke via geniaj inklinoj ne estas laŭvalore taksataj, ktp.

Incidente la aminda babilulo singarde, kaj pro nura scivolo, tiam kaj tiam metas demandeton, kiun vi ja tre senkulpe respondas, ne suspektante ajnan malbonon. Post tio la vizitanto estas kontenta kaj plej ĝentile adiaŭas.

Vi ree eklaboras, kvazaŭ nenio estus okazinta. Sed nu? Kelkajn tagojn poste vi, artisto, ricevas revuon, vi havas en ĝi vian portreton, la portreton de via domo, de via ĉambro, ktp. Vi ne trovas en ĝi la raportiston, sed vin mem babilanta, sed ja babilanta pri ĉio kaj la cetero. Vi verdiktas kun la tono de pacjuĝisto pri viaj proksimuloj, klarigas viajn konceptojn pri ĉio ekzistanta en la artmondo; diras kiun vi amas kaj kiun vi ne povas suferi; sub la formo de promesoj vi disvolvas ĉiujn planojn kiujn vi portas en la korpo kaj ĉiujn majstroverkojn, kiujn vi donacos al la posteularo.

Klarigata estas via tuta vivmaniero,

kaj por Dio kaj ĉiuj homoj estas nun konate: kiam vi en- kaj ellitiĝas, kiom da fojoj vi mangas, kiom da pipoj vi fumas, ĉu vi jes aŭ ja ne portas vestojn kaj kolumojn; kaj, supleme, vi nun scias kiel vi konduku al la publiko por esti vi mem kaj simil vin mem! Krome estas menciita la bona konsilo: kion vi estus devinta fari kaj kio mankas al vi por esti vera, kompleta geniulo — ĉi tio estas la nuraj saleroj kiuj amarigas la pladon, senpage servitan al vi. Vi cetere povas akcepti tion kiel vi volas, neniu demandas al vi pri tio! Ĉefe: estas kontentigitaj kaj la publiko kaj la scivolo.

El tio ne konkludu ke tiuj novaj moroj, tiu nova maniero estas kondamnendaj — cetere malmulte utilus; — tio fariĝis neevitebla neceso, al kiu la artisto submetiĝu.

La scivolo de la publiko por la artisto povas kaj do devas esti interesiĝo por la produkto, — la arto. Cetere estas artistoj al kiuj malgravas la forlaso de ilia rifuĝejo kaj kiuj bonvole aŭ kun plaĉo akceptas tian enketon kaj volonte kunlaboras en tiu ekspozicio. Ja vanus enŝlosi sin; oni ne naĝas kontraŭ la fluo. Kaj la pruvo: ja ankaŭ mi mem lasis min konvinki ke mi rakontu: kiel oni fariĝas verkisto.

(Fragmento de „Kiel oni fariĝas verkisto“. El la jus aperinta volumo IX de lia kompleta verkaro p. 9-13).

El la Nederlanda Poezio

LA BULVARDULO

GEERTEN GOSSAERT (*)

*Samkiel la leono, naskita en sklaveco,
Ja ne forgesas pri la devena vera stat'.
Sed ĉiam mezuradas, - revata libereco -
Malvaston de la kaĝo en nerva promenad'.*

*Samtiel pri neniam perdita la Edeno,
Li revas, en la kaĝo de la volupt', dolor'.
Eluzas sur cemento de l'monda urb-areno
L'elaston de l'piedo, la puron de la kor'.*

*Sed kiam rododendroj repompas en la skvaroj,
Ho foje nekonscie devigas lin komand'
Ekrompi l'urban sorĉon kaj tra l'mizer-kvartaloj
Li nostalgie fuĝas al la printempo-land'.*

*Li ne returnrigardas, timante la ripozon,
Rapidas tra herbejoj, arbaroj pro ĉi pel',
Kvazaŭ kastel-perdinto fuĝanta furiozon,
Atenta pri la mejloj post si, sed ne pri cel'.*

Sed kiam vesperiĝas kaj sub la altaj arboj

(*) Prof. D-ro F. C. Gerritsen (1884) *El „Eksperimentoj“*

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44 Wilrijk (Antverpeno)

Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing

Ĝenerala Sekretario-Kasisto: S-ro H. Sielens. Maaldersstraat, 37 Antverpeno

ADRESSANGOJ

Pro la anstataŭigo de D-ro Kempe-neers, ĉiu korespondado estas, de nun, sendota al la adreso de la Prezidanto: S-ro Maur. Jaumotte, 44, Avenue De Bruyn, Wilrijk. Same ankaŭ la raporto kaj ĉio kio rilatas al nia revuo.

Aliflanke, ni atentigas pri la ŝanĝo de la persona adreso de nia ĝenerala sekretario-kasisto, S-ro H. Sielens, kiu ĵus transloĝis. Lia nova adreso estas:

Maaldersstraat 37, Antverpeno

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“
(Poŝteĉkonto No. 726.54)

La 19an de marto, paroladis S-ino Etty Graeffe, denaskiĝa belgino, sed kiu, antaŭ dudek jaroj jam, elmigris al Usono. La temo, kiun ŝi pritraktis, estis „La Vivo en Usono“: tre interesa parolado, en kiu la paroladistino, — fervora anino de la „Bahismo“, — dediĉis parton vige pledan al religio, kies komuna lingvo estus Esperanto. Ŝi ankaŭ aŭdis, flute, diversajn tipajn usonajn melodiojn kaj montris lumbildojn, kiujn ŝi interese kaj sprite komen-

*El stranga arbitaĵo leviĝas la nebul',
Rimarkas turpinteton, tutnigran sur or-farboj,
montrantan al ĉielo, avide la okul'.*

*Kaj li rapide sekvas vojsulkon tra l'senhoma
Kamparo, ĝis resonas paŝ' lia sur pavim',
Kie kampula laca ĉe l'propra pordo doma,
Afable lin salutas - vespera pi-esprim'.*

*Kaj vidas li kaŝita, de el preĝej-portalo,
-Junuloj rondodancas sur la vilaĝa plac'-
Leviĝi en ĉiela senbrile ora halo,
Eburan printemplunon, senditon de la pac'.*

*Subite tra kulsvarmo ekŝvebas preter lia
Okulo konfuzita el alto la hirund',
Kiu elektis neston trankvilan en dom' dia
Kaj malaperas nun en la vespera fund'...*

*Ho la flugiloj preskaŭ ektuŝis lian vangon'
- La hasta, de l'feliĉo revita, flugil-bat' -
Kaj manpugnige ĝemas li, lip-elmordas sangon,*

L'ungegon sentas de la sopir' kaj memkompat'.

(trad. H. Vermuyten)

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO,

RADIO kaj GRAMOFONO

MAJO: La 7an: Parolata ĵurnalo; la 14an: Parolado de F-ino H. Hofkens, pri „Malnova Egiptujo“; la 15an (sabate): PRINTEMPA BALO; la 21an: Diskutvespero; la 23an (dimanĉe): SURPRIZA AUTOCAR-EKSKURSO; la 28an: Kabareda Vespero, kun DIPLOMDISDONO al la lernantoj de F-ino Henny De Ketelaere.

JUNIO: la 4an: Parolata ĵurnalo; la 5an, 6an kaj 7an (Pentekosto): en Lieĝo: BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO; la 11an: Prikongresaj Raportoj; la 18an: Vizito al la Antverpena kermeso; la 25an: Parolado de S-ro H. Vermuyten; la 27an (dimanĉe): Malgranda ekskurso estas antaŭvidata.

Gratuloj

Ni gratulas la simpatian kasiston de la Antverpena Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“, S-ron René Balleux, kiun oni festis en la „Gulf Oil“, okaze de lia jubileo pro 30jara deĵoro kaj kiu akiris, tiukaze, la unuaklasan Industrian Medalon.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝteĉnumero 4835.33)

La mardaj kunvenoj estas regule ĉeestataj de la plej fidelaj membroj. La kunveno de la 10a de marto estis ĉefe dediĉata al legado de Belga Esperantisto. Kelkaj klarigoj faris ke tiu legado povas esti konsiderata kiel perfektiga leciono.

Plia tia leciono okazis la 23an de marto per legado kaj klarigado de la grupa statuto. Kelkaj humorajoj gajigis la lastan parton de la vespero.

Leciono de la elementa kurso estis donata la 30an de marto; poste estis raportata pri la ekskurso de dimanĉo 28a de marto al Ostendo, kie kelkaj junaj gemembroj iris por vidi la karnavalan sekvantaron; kaj fine okazis la gaja surpriz-vespero per dislotado de la nekonataj premioj.

La 6an de aprilo, denove komuna perfektiga legado kaj poste portretludado.

Parolata gazeto estis eldonata la 13an de aprilo kun kontribuoj de F-ino De Staercke kaj de S-roj Ch. kaj M. Poupeye, ĉiuj pri humorajoj.

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

— Moderna komforto —

Sidejo de Bruga Grupo Esperantista.

Tel. 314.59

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Plia leciono de la elementa kurso estis donata la 20an de Aprilo, post kio okazis triopa interparolado. La ĉeestantoj sidigis po tri, laŭ indiko de la prezidanto, je apartaj tabloj kaj tie havis libervolan konversacion tre lernigan por la novaj gemembroj.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ordinara kunveno: ĉiumarde je la 20-a en la sidejo „Gouden Hoorn - Cornet d'Or" Simon Stevinplaats, 2;

La unua horo de ĉiu kunveno estos dediĉata al leciono de elementa kaj ripetiga kurso. Dum la dua horo de la kunveno:

MAJO: 4an Raportado pri la kermesa foiro; 11an: Komuna legado de B.E.; 18an Portretludo; 25an: Humoraĵoj.

JUNIO: 1an: Parolata gazeto kaj lastaj aranĝoj por la kongreso. 8an: Raportado pri la Beneluksa Kongreso en Lieĝo; 15an: Humoraĵoj kaj portretludo; 22an: Muzika vespero; 29an: Parolado: „Vojaĝo al Karintio kaj Venecio".

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero): 1230.48.

La 15-an de marto S-ro VanderStempel gvidis, kiel ĉiam humorene sed tamen tre instrue, la perfektigan kurson. Li speciale pritraktis la akuzativon, tiun diableton kontraŭ kiu oni tiel facile kaj ofte pekas.

La 22-an, okazis tre agrabla vespero, kiun multe da gesamideanoj ĉeestis. Estis la vico de S-ino Castel, kiu unue regalis nin per la legado de tre spritaj humoraĵoj kaj poste per la jam tradiciaj ege bon-gustaj karnavalaj kukaĵoj. Komuna kafe-kaj ĉokoladotrinkado agrabligis ankoraŭ pli la humoron de la multnombraj ĝeĉeestantoj. Ankoraŭfoje, ni esprimas ĉi tie nian dankon al S-ino Castel por ŝia granda afableco, kiel gastigantino.

La 29-a estis rezervita al S-ino Ernst, kiu resumis, — kiel ĉiam, kiam estas ŝia vico prelegi — libron. Tiun ĉi fojon ŝi

elektis la konatan teatraĵon de Maurits Dekker: „La Mondo ne havas Atendejon." Ne necesas diri ke tiu teatraĵo jam havis multe da sukceso en diversaj landoj. Ĝi estas nuntempa dramo, traktanta la uzadon de la interatomaj fortoj por detruaj celoj. S-ino Ernst sukcesis reteni la atenton de la gesamideanoj dum preskaŭ unu horo. Multe da aplaŭdo rekompencis ŝian laboron.

La 5-an de aprilo, okazis la parolata gazeto: S-ro VanderStempel akiris la plej altan poentnombron kun sia artikolo: „Kosmaj Katastrofoj." La dua gajninto estis S-ro Castel, kiu parolis pri „La Paco" kaj la tria D-ro Kempeneers, kiu legis tre interesan artikolon pri „La Mondo en Katenoj".

Programo por la estontaj kunsidoj:

MAJO: la 3-an: Parolata gazeto; la 10-an: S-ro Castel: Miguel de Unamuno renkontas Alphonse Daudet; la 17-an: S-ro VanderStempel: Perfektiga kurso; la 24-an: S-ro Van Geit: Pri insektoj (Tria parto); la 31-an: S-ino Elly Staes: La simfonia orkestro (kun diskoj).

JUNIO: la 7-an: Pentekosto, beneluksa kongreso; la 14-an: Parolata gazeto; la 21-an: S-ro VanderStempel: Perfektiga kurso; la 28-an: S-ino Daems: „Terpomo" (batata).

La 10-a T.E.J.O. - Kongreso

La L.O.K. invitas ĉiujn junajn Esperantistojn, veni al nia Jubilea-Kongreso, kiu okazos de la 24a ĝis la 31a Julio.

Pagojn: Ned. Handel Mij., agentschap Hilversum, je la nomo S-ro J. Jorckveld.

La kongresejo:

Restado, restoracio, amasloĝejo, granda salono por kunvenoj kaj festvesperoj en la Hilversumaj Sporthaloj.

Pri la provizora programo kelkajn detalojn:

Sabato 24/7: Solena inaŭguro de la kongreso.

Akcepto de la urba estraro en la Civitana Salono de la Hilversuma Urbodomo.

Dimanĉon 25/7: Protestanta kaj katolika diservoj, publika propaganda kunveno kaj grandstila Nederlanda festvespero.

Lundon 26/7: Jarkunsido de T.E.J.O. kaj Internacia Kabaredo-vespero.

Mardon 27/7: Tuttaga ekskurso, i.a. al Madurodam, Hago, Scheveningen, Rotterdamo k.t.p.

Merkredon 28/7: Ekskurso al Amsterdamo, vizito al la Hilversuma foi-

Bibliografio

D-ro PAUL NEERGAARD: Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj kaj kiel prilukti ilin, eldonita de „The Esperanto Publishing Company Ltd", Rickmansworth, Anglujo, 1954. 234 p., 75 fig. kaj 9 koloraj bildpaĝoj (*).

La libroj esperantaj en certa grado estas la vestoj de nia movado: ili montras al la ekstera mondo la staton de la esperantismo. Ili ja pravas ke ekzistas publika kiu aĉetas tiajn librojn, kiu ŝatas ilian laŭnhavan kaj laŭspektan valorojn. La libro „Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj" estas unu el tiuj libroj, kiujn oni fiere povas montri, ĉar ĝia enhavo el scienca vidpunkto estas elstare bona kaj ĝia aperaĵo estas unuaranga: preso, ilustrado, bindo kaj papero. „Esperanto Publishing Company" meritas gratulon pro tia eldonaĵo, kiu parte estas kleriga libro pri la plantpatologio, parte konsultlibro por hortikulturistoj kaj ĝardenamatoroj. Tiaj verkoj maloftas en Esperantio. Ĝia eldonaĵo estas pli malpli eksperimento: Ni esperas ke la aĉetemo de la esperantistaro estos nedubebla stimulo al la eldonejo daŭrigi la aperigon de tiaj libroj.

En la antaŭparolo la aŭtoro mencias, ke la verkado havas du celojn: „parte prezenti enkondukon en la sciencojn, kiun la libro pritraktas, parte kulturi novan kampon faklingvan en Esperanto, do certgrade konsistigi terminaron". Plue sed tio ne estas dirita en la libro — la eldono povus prezenti al la neesperanta mondo moderna konsultlibron, kiun valoras eklerni esperanton. En tiuj landoj, kie tia libro mankas, la fakaj kvalitoj de la libro valoras akiri la legokapablon

(*) La libro parolas pri koloritaj „tabuloj", kio ŝajnas al mi ne-rekomendinda vorto por bildpaĝo.

ro kaj Kultura Vespero kun muziko, deklamo k.t.p.

Ĵaŭdon 29/7: Internacia Balvespero. Krome: Paroladkonkursoj, sporto. Ĉiutage la Parolata gazeto kaj versaĵne kongresbulteno.

La kostoj estas malaltaj: Por la tuta semajno, programo, ekskursoj, restado kaj manĝado en la kongresejo:

por T.E.J.O. membroj f 55.— (a por ne T.E.J.O. membroj f 60.— (b Por la tuta semajno, kiel ĉi supre,

sed ekskluzive dormado kaj matenmanĝo:

por T.E.J.O. membroj f 50.— (c por ne T.E.J.O. membroj f 55.— (d Atentu: ĉe aliĝo post 15/5 '54 la prezoj, altiĝos per f 2,50.

Enskribigu vin kiel eble plej baldaŭ ĉe la Loka Organiza Komitato, Lobeliastraat 4, Hilversumo, Nederlando.

NOVA PETO

Ce la transpreno de la arkivoj de la Ligo, la nova Prezidanto konstatas, ke, en lia postmilita kolekto de „Belga Esperantisto", mankas la No. 1 de la jaro 1950a.

Se iu membro posedus tiun ĉi numeron kaj ĝin ne bezonus por sia propra kolekto, ĝi estus danke akceptata.

Eventuala alsendo okazu al la adreso: De Bruynlaan 44, Wilrijk.

pri esperanto. Kolegoj recenzantoj do recenzu ankaŭ en neesperantaj fakgazetoj!

La esperantistoj ĝuas la bonŝancon havi inter si specialiston kiel NEERGAARD kun mondfama reputacio kiu enkorpiĝis sian grandegan sperton kaj scion kaj multe de sia tempo en la ĉi priparolata verko. Ĉu tio signifas enfermo de scio kaj peno internen de la limoj de nia lingvo aŭ male, la plej efika utiligo sekve de la mondvasteco de Esperanto, dependas de ni, esperantistoj. Oni sentas, ke ni havas en niaj manoj la respondon al tiu demando, kiu povas esti decida koncerne eldonadon de faklibroj en la estonteco. Ĝi devigas nin diskonigi la libron kiom eble plej multe.

En diversaj klare verkitaj ĉapitroj ĝenerala informo estas donata pri la baza scio kaj penslinioj de la scienco de plantmalsanoj. Tiuj ĉapitroj estas interesaj kaj instruaj por ĉiu, kiu ŝatas havi superrigardon pri la moderna scienco, kiu estas tiel grava por la hortikulturo kaj por la produktado de fruktoj, legomoj kaj floroj. Aliaj ĉapitroj estas speciale verkitaj por la praktikisto, ĉu la profesia ĝardenisto, ĉu la amatora ĝardenposedanto. Ili donas ĉian helpon ĉe la rekonado de la simptomoj de malsanoj kaj parazitaj atakoj al la plantoj. Ili ankaŭ donas ĉian necesan informon por efike batali la mankojn aŭ difektantojn. Multe de tiu informo estas prezentita en lertaj kaj supervideblaj tabeloj.

Oni povas diri, ke ĉiuj facetoj de la komplikita materio estas detale pritraktita. La priskriboj de malsanoj kaj simptomoj estas koncizaj kaj klaraj ankaŭ dank'al multaj bonaj fotoilustraĵoj kaj bele reproduktitaj koloraj bildoj, kiuj lastaj estas kunigitaj sur 9 elfaldeblaj folioj.

La lingvaĵo estas kiel oni povas atendi de membro de nia Akademio. En la titolo de la libro la uzo de „al"

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabeloj; KATOKULO, por signalvitroj.

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ
Antverpeno

M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10 % por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.
Suoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66.
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
Henny de Ketelaere, Oostenstraat, 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
Roger Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Ĉiuj anoncoj kaj reklamoj en tagjurnaloj
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Begijnenstraat 3, Antverpeno.
Okulvitroj — Rabato de 5 % por la membroj. Tel. 35.09.32.
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67.
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47.
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijk, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiuj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltajoj.
M. Blajwas, Lange Kievitstraat 80, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

KOMERCISTOJ kiuj sen koste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj.

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81 Frizisto por sinjorinoj.
„De Boerinekens" (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikoloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktojo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj
Van Kerekhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj, ĝardenilaro
Butiko Angora (novaj galerioj), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj; sportŝuoj

Bruselo

Farmacisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE", 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Liens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart", 19, avenue de Saül 21.74.49
Viaĵa MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX" 16, rue Esnest Laude 15.28.29

anstataŭ „kontraŭ" mia opinio estas preferinda kaj pli klara. (Atakoj al ĝardenplantoj). Estas kompreneble ke pritrakto de specialisto fako postulas multajn faktermojn, kiuj ankaŭ mankis en Esperanto. Ke Neergaard elektis por plantoj, parazitaj kaj malsanaspektoj prefere tradukitajn, do esperantigitajn nomojn aŭ anglajn estas ĝojiga kaj montras kiom vigle vivas Esperanto. Ringospinulo, saks-porfungo, pirvespo, pokalrusto, hajl-trua malsano, folipulo estas nur kelkaj ekzemploj. Tamen transpreno de neologismoj el la scienca jargono estis necesa. Ĉiuj fakterminoj estas klare difinitaj kaj en la teksto kaj en la terminara listo en la lasta ĉapitro. Kritiki la enkondukon de nova fakter-

mino estas malfacile, ĉar nur la verkanta specialisto scias ĉiujn motivojn por tio. Tamen mi kuraĝas dubi, ĉu esperanto vere bezonas terminojn kiajn „masklo" kaj „femalo" por vira kaj ina vivaĵo, „soso" por vergosimila branĉo, „sporangio" por sporujo, „suscepto" por mastroplanto kaj „susceptema" por infektibla, senrezista.

Konklude: ĉi tiu libro estas elstara gajno por nia fakliteraturo kaj oni miras pri la relative malalta prezo por tia belaspekta kaj riĉe ilustrita verko.

G. F. Makkink.

Nekrologo

Senatano Georges Mazereel

Kun konsterniĝo ĉiuj esperantistoj eksciis pri la preskaŭ subita morto de S-ro Georges Mazereel, senatano, membro de la Honora Komitato de R.B.L.E. kaj kiu efektive interesis pri ĉio kio rilatas al nia movado kaj kun intereso sekvis ĝiajn progresojn. Al lia funebranta familio iras niaj sinceraj kondolencoj.

Nia Gazetara Servo

NIA LABORO: En 1953, nia Gazetara Servo redaktis kaj dissendis 24 artikolojn, do meze po unu ĉiudonmonate, al 70 ĵurnaloj, gazetaragentejoj kaj radio-organizaĵoj (41 franclingvaj, 23 flandralingvaj, 6 luksemburgaj).

Krome ni regule sendis niajn eldonaĵojn dokumentacele al kelkaj gravaj instancoj: Ministerio pri Publika Instruado, k.t.p. kaj intersanĝis ilin kun 16 en- kaj eksterlandaj E-gazetaraj servoj.

REZULTATOJ: Dank' al la kunlaboro de E-grupoj kaj izolitaj E-istoj, ni povis recenzi minimume: 209 artikolojn. Tiuj artikoloj estis publikigitaj en 26 gazetoj (14 franclingvaj, 12 flandralingvaj).

Por komparo, jen la rilataj ciferoj por 1952: 65 artikoloj en 15 gazetoj.

Tiuj eltondaĵoj koncernas nur artikolojn por ĝenerala informado pri E-o, ekskluzive de la informoj pri la vivo de la E-grupoj (anonco de kunvenoj kursoj, k.t.p.), kiuj estas prizorgataj de la lokaj grupoj mem;

Tiuj 209 estas minimumo. Tiu nombro koncernas nur la artikolojn, kiujn ni mem povis kontroli, sed kompreneble ankaŭ aliaj aperis.

ELDONKVANTO: Ŝajnis al ni interese kalkuli kiom da ekzempleroj reprezentas tiuj 209 artikoloj. Ni baziĝis sur la ĵurnalaj eldonkvantoj publikigitaj de la BELGA SINDIKATA ĈAMBRO POR REKLAM-ARTO, 24 rue du Congrès, Bruselo. Ni atingis la atentindan nombron de 40.806.456 ekzempleroj.

Dank' al nia Gazetara Servo ĉiu Belgio havis do okazon legi almenaŭ 4-foje dum la jaro informon pri E-o.

Por atingi simile vastan informadon per uzo de klasikaj metodoj (cirkuleroj, presadoj, propagandiloj, k.t.p.) ni bezonus budĝeton de minimume pluraj centmiloj da frankoj.

Laŭlingve, tiuj 209 artikoloj dividigas: por la franclingva gazetaro, en 104 kaj 18.713.668 ekz. kaj por la flandralingva gazetaro, en 105 kun 22.092.788 ekz.; tio malgraŭ la fakto ke ni dissendas niajn komunikaĵojn al 41 franclingvaj kaj nur 23 flandralingvaj gazetoj.

Ĉu tiu ĉi lastaj pli facile enpresas aŭ ĉu ni estas pli bone informataj pri tiuj ĉi?

Klasigante la gazetojn laŭ la plej granda nombro da aperigitaj artikoloj, ni povas citi la jenan honoran liston:

Franclingvaj gazetoj:

1. Le Moustique
2. La Nation Belge
3. Le Matin
4. La dernière Heure
5. Le Soir

Flandralingvaj gazetoj:

1. De Werker
2. Het Laatste Nieuws
3. De Volksgazet
4. De Natuurvriend
5. De Nieuwe Gazet

Fina noto estu, ke „Le Moustique” kaj „De Werker” havas propran Esperantist-redakoron.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

(Solvaj sendotaj al B.E. ĝis la 22.5.54)

Poentojn akiris por la n-roj 7 kaj 8: 5 p.; S-ino Ernst (Bruselo) kaj S-roj Ch. De Corte (Blankenberge), kaj J. Soyeur (Seraing).

SOLVOJ.

7. pupil; okul; suker; tuber; satan; ulan; fazan; etager; retin; ordin; vesper; eman; nomad; altan; societ; paper; ripar; omar; sonet; parter; ekzemplar; ripet; ovul. Post sufero venas prospero.

8. *Hor.*: vind, or, loti, prav, rem, alte, ski, for, ist, bel, bu, art, er, etulin, re, lip, etul, dir,flug, il, help, maskobal, kupra, akord, inversig, pulio, kling.

Vert.: varb, elf, kep, bril, nimfe, pum-pil, ole, garni, par, te, savo, orl, butik, rat, ululo, vei, il, bask, san, haki, ojstr, delogi, tril, inic, erp, dig.

9. KUNMETU

el la 72 subaj litergrupoj: 24 naŭliterojn vortojn laŭ jenaj klarigoj. Iliaj triaj literoj, samorde legataj, formas proverbon.

Klarigoj: 1. tute elementa; 2. li multe studis; 3. muzikilo; 4. kromvirino; 5. kaŭzi ŝvelon kaj doloron en organo; 6. li plenumas nenian oficialan rolon; 7. en kontraŭa pozicio; 8. desegno en teksto; 9. ŝercrompi; 10. igi korpon kapabla produkti elektraĵojn fenomenojn; 11. ĝi altiras turistojn; 12. li ŝatas danganteran entreprenon; 13. oftig viziti; 14. iu malsanulejo; 15. fari ion denove bonstata; 16. varmigebla halo, kie oni konservas delikatajn arbojn; 17. sufokpremi; 18. ordoni, ke malsanulo uzu iun medikamenton; 19. ĉirkaŭanta frazo, kiu donas al difinitiva vorto ĝian precizan difinon; 20. intermite ĵeti lumbrilojn; 21. li restas ĉe propra opinio, malgraŭ kontraŭaj admonoj; 22. acetantoj; 23. ies maniero prijuĝi; 24. meti (sian fingron) en flamon.

Litergrupoj: 1 ajo, 2 ajo, 3 ako, 4 alv, 5 ang, 6 aro, 7 ato, 8 bru, 9 ele, 10 enc, 11 ent, 12 fre, 13 ibi, 14 ide, 15 igi, 16 igi, 17 iki, 18 ili, 19 ilu, 20 ime, 21 ind, 22 inf, 23 ino, 24 izi, 25 kem, 26 kfi, 27 kon, 28 kto, 29 ktr, 30 kub, 31 kun, 32 kve, 33 lam, 34 lvu, 35 mbr, 36 mis, 37

ndi, 38 nge, 39 nta, 40 nti, 41 obs, 42 oli, 43 ono, 44 ora, 45 pre, 46 pri, 47 pun, 48 rdi, 49 ref, 50 reŝ, 51 rio, 52 rio, 53 ris, 54 rud, 55 san, 56 sci, 57 skr, 58 sto, 59 str, 60 str, 61 tek, 62 tif, 63 tin, 64 tre, 65 ulo, 66 ulo, 67 ulo, 68 ulo, 69 vat, 70 vid, 71 vid, 72 vid.

10. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. sola en sia speco (R). 3. detruo la vivon per malutila substanco (R); ĝi estas uzata por fari tegmentojn (R). 4. ideala modelo (R). 5. ĵuna servisto en hoteloj; deklari ion bona (R). 6. amiko saluto (R). 8. pretigi pafilon (R); du voĉoj aŭdigantaj samtempe saman noton (R). 10. desegnajeto por ornamo libron (R); mezuri la profundecon (R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

Vertikale. 1. sin movi persipe. 2. ŝanĝi laŭ la cirkonstancoj. 3. formangi (R). 4. perdi (R). 5. parto de la vizago (R). 6. kun kondiĉo redoni post difinitiva tempo. 7. konprigi al si, kaŭzante al aliaj malutilon (R). 8. membrano kovranta ostojn (R). 9. enigi en staton de fortore-freŝiga ripozo (R). 10. ilo por fendi lignojn. 11. povanta patologio difektigi (R).

Por viaj esperantaĵoj,
libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26
ANTVERPEN

kin ankaŭ havigos al vi nacilingvajn
librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj
ĉiuspecan skribmaterialon.

ATENTU

La sekvonta numero de nia revuo aperos en la fino de junio aŭ komenco de julio kaj enhavos la raporton pri la Beneluxa Kongreso en Lieĝo.

Verantw' uitgever: Rega Belga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)